



Kulturaj Kajeroj

E.M.A.H.C. →

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44 - NANTES, Francujo

JARABONO :

Simpla : 10 fkoj } P. BABIN
Bonfara : 15 fkoj } 13, boulevard de la Chauvinière
44 - Nantes
P.Ĉ.K Nantes : 2.813.61

(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

JANUARO - FEBRUARO

1970

1

KULTURAJ KAJEROJ

1970

JANUARO - FEBRUARO

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

P. Babin, 13, boulevard de la Chauvinière
44 - Nantes

Komitatanoj :

Paul Guillot
Frédéric Thébaud
Pierre Chevalier

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

ENHAVO

El Grésillon

Aktivajtoj.

Esperanto tra la Mondo

A. Frangeul

El Normandio

Vire kaj Bocage

A. Legret

Gravaj datrevenoj

Thomas Cook (2-a parto)

P. Brachon (trad. S.G.)

Nigra diamanto

La Trufo

Trad. S.G.

Rakontoj

La noktovazo

J. Renard
(trad. J. Lenel).

La trista fraŭlino

L. Tihanyi

Por via distro

Nia konkurso

P. Chevalier

Gramatika per bonhumoro

KULTURAJ KAJEROJ

ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ

spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ

publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ

respondos al gramatikaj demandoj.

KULTURAJ KAJEROJ

prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzojn.

Ni deziras ke « Kulturaj Kajeroj » plaĉu al vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn

AKTIVAĴOJ

Vi deziras lerni, plulerni, ellerni Esperanton ;
Plaĉas al vi la interesaj prelegoj ;
Vi ŝatas la teatron kaj pupteatron ;
Allogas vin libro-bindado, korbifarado, ceramiko ;
Vi deziras viziti regionon riĉan je vidindaĵoj ;
Petu la programon. Vi certe trovos periodon konvenan.

PASKAJ FERIOJ :

1a SEMAJNO (22-29 de marto) :

9a KULTURA SEMAJNO DE U.F.E.-G.E.E.

kun partopreno de Sro Sunardo el Indonezio

2-a SEMAJNO (29an de marto - 4an de aprilo) :

APLIKADO DE LA LINGVO

DUM LA SOMERO :

1-a periodo (28an de junio - 12an de julio) :

SEMINARIO POR KURS -- KAJ GRUPGVIDANTOJ

Kun Sino Vincent kaj Sro Ribot
Kiel aktivigi grupon

2-a PERIODO (12an - 26an de julio) :

TEATRO - ARTO EN ESPERANTO - AKTORADO - PUPTEATRO

3-a PERIODO (26an de julio - 9an de aŭgusto) :

KURSOJ -- EKZAMENOJ

4-a PERIODO (9an - 30an de aŭgusto) :

KURSOJ -- EKZAMENOJ

Bindado — Korbifarado — Ceramiko
Ekskursoj okaze de ĉiu periodo !

Tuj aliĝu ! Jam multaj informetoj alvenis.

E.K.D. Grésillon -- 49 - BAUGE

Esperanto tra la Mondo



La universala kongreso vige prepariĝas :

Sro Franz Jonas, Prezidanto de Aŭstrujo, bonega esperantisto kaj alta protektanto de la kongreso promesis partopreni persone la inaŭguron de la kongreso kaj mem prezenti salutparoladon en esperanto.

Antaŭkongreso : en Bratislava (Ĉeĥoslovakujo), 29.7-1.8 ; post kongreso en Linz 8.10.8.

Internacia Junulara kongreso : 8.15.8 Graz. Adreso por informo : 26a I J K, Heinz Kovacic, Grazbachgasse 57, A-8010 Graz — Aŭstrujo. La temo de la ĝenerala kunveno de U.E.A. dum la kongreso estos : « la Internacia lingvo, kiel instrumento por eduko al internacia konceptado de la mondo ».

Konstanta adreso de la kongreso en U.E.A. : Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam 3002, Nederlando.

La internacia kongreso de S.A.T. : Tiu kongreso okazos en Aŭgsburg, Germanujo, de la 25a ĝis la 31a de Julio. Adreso : K. do Hermann Schmid, D 8901 Westheim/Aŭgsburg, Seb. Kneippstr. 6.

Katolikoj kaj protestantoj komune kongresos : Sub titolo « Kongreso de Kristanaj esperantistoj » la membroj de IKUE (katolikaj esperantistoj) kaj de Keli (protestantoj) kunvenos en Brno, Ĉeĥoslovakio, de la 24a ĝis la 31a de Julio (tuj antaŭ la universala kongreso).

Edukado :

La jaro 1970 estas deklarita « Internacia Jaro de Edukado ». U.E.A. starigis programon por partopreni tiun kampanjon aranĝitan de UNESKO interalie pere de konferencoj kaj kunvenoj pri edukaj problemoj, agado por vastigi la esperanto-instruadon en la lernejoj kaj universitatoj, eldono de dokumentoj pri la valoro de tiu esperanto-instruado, ktp.

Laŭ la lasta enketo de la Centro Esploro kaj Dokumentado, en la lerneja jaro 1968-69, oni instruis la internacian lingvon al 18.881 ĝelernantoj en 691 lernejoj de 31 landoj (tiuj ciferoj devas esti rigardataj, kiel minimumaj).

Por la ĝejunuloj kaj aliaj : Konkero de ĝejunuloj estas nepre urĝa agado por nia movado. La ĝejunuloj disponas pri bela revuo en esperanto : « Kontakto » sed, se vi estas malpli juna kaj membro-abonanto de U.E.A., vi rajtas al enkonduka abono al « Kontakto » kontraŭ nur 5 guldenoj. Viajn ĝeamikojn vi povas varti aŭ abonigi je la normala kotizo de 8 guldenoj jare, aŭ, se ili estas malpli ol 26-jaroj kaj indikas sian naskiĝdaton, kontraŭ 5 guldenoj.

(La membroj-abonantoj de U.E.A., malpli ol 25 jaroj, ricevas aŭtomate « Kontakto », se ili indikas la naskiĝdaton).

Tutmonda Esperantista Junulara Organizo eldonis interesan broŝuron en la lingvoj angla kaj franca. Titolo : « TEJO, internacia komunikado ». Ven-

das po 0,12 ned. gld : NEJO-kom. de TEJO, Kastelestraat 231, Amsterdam 2, Nederlando.

Aŭtomobilistoj :

Internacia esperanto klubo aŭtomobilista invitas vin — se vi posedas aŭtomobilon — helpi en starigo de potenca organizo : per UNUFOJA kotizpago de egalvaloro de 4 gld la esperantistoj fariĝas membroj de IEKA. Ili ricevas la Klub-insignon gluotan sur la aŭton kaj ilia nomo eniras la adresaron de la Klubo.

Paralele, la klubo instigas la membrojn fariĝi fak-delegitoj de U.E.A. por aŭtomobiloj kaj SOS-Servo. Celo de IEKA estas ankaŭ la definitiva eldono de « Aŭto-terminaro ».

La internacia korespond-adreso de IEKA estas ĉe S-ro Giuseppe Grattapaglia, via Vigliani 15/10, 10135, Torino, Italujo. (Oni scias, ke S-ro Grattapaglia estas propaganda fakulo en la entrepreno Fiat, kiu multe eldonas en esperanto).

Jen moderna kaj por ni facila rimedo por penetri la fakajn aŭtomobilajn mediojn. Pagu eventuale al via nacia esperanto-asocio sed legu « Esperanto » de januaro (paĝoj 4-5).

Turismo :

« Esperanto-turismo », Matije Gupca 27, Zemun, Jugoslavio, aranĝos en 1970 tri turismajn cirkvitojn : « Noktomeza suno » (aŭtobuso ekveturos de Kopenhago ; datoj : 20a de junio, 11a de julio, 10a de aŭgusto). « Adrio-Akropolo » : Jugoslavio, Bulgario, Grekio (pluraj ekiroj el Ljubljana por 3 semajnoj, kiel la antaŭa cirkvito). « Oriento vokas » de Vieno al Japanujo tra USSR per aviadilo, vizito de la mondekspozicio en Osaka, Honkongo, Kamboĝo, Hindujo, Nepalo, Teherano. Vieno. 30 tagoj inter la 4a de julio ĝis la 2a de aŭgusto.

Kursoj :

Jen kion proponas al vi ŝveda firma : unu tekstlibro estas en esperanto kaj la alia en via nacia lingvo. 23 lingvoj estas disponeblaj, do, la materialo povas esti uzata por perfektigo ankaŭ en alia fremda lingvo : via nacia lingvo en libreto kaj la dezirata lingvo sur la alia libreto kaj sur la diskoj.

Por la komputilistoj :

Se vi laboras pri komputiloj (ordinatoj) rilatu kun Sro Dro K. Schlüter, 3167 Burgdorf, 17, Kirchweg 20, Germanujo : li preparas liston de la koncernataj teknikistaj esperantistoj.

EL NORMANDIO

VIRE KAJ BOCAGE

Mia urbo Vire (12.000 enloĝantoj) situas en Normandio, 60 kilometrojn sudokcidente de Caen, 275 kilometrojn okcidente de Parizo, 70 kilometrojn de fama « Mont Saint-Michel ». Laŭ geografo E. Reclus ĝi « gaje situas » sur la deklivoj de pluraj montetoj. Ĝi estas la ĉefurbo de « Bocage » (Bokaj), regiono pentrinda, verda, kun multaj arboj kaj heĝoj dividantaj malgrandajn herbejojn. Tie troviĝas ankaŭ multaj

montetoj, de kiuj oni ofte povas ĝui vastajn, belajn panoramojn. En Bocage la valoj estas sufiĉe profundaj, en ili fluas multaj malgrandaj riveroj rapidfluaĵaj, trut-riĉaj. La plej granda rivero estas la Vire, laŭ kiu estas nomita la urbo. Inter la altaj heĝoj serpentiras ĉarmaj « kavaj » vojetoj. Montriĝas ankaŭ ŝtonegoj (granito, skisto). En iu loko (Le Gast), granitaj rokoj formis kuriozan ĥaoseton.



Foto, Studio Polda, Vire

Sur la herbejoj sin paŝtas dikaj normandaj bovinoj, kiuj produktas grandegan kvanton da lakto. En 1968 la Vire'aj buterfabrikoj produktis 22.550.000 kilogramojn da butero. Estas ankaŭ fromaĝ-fabrika (fama Camembert). La grava semajna foiro (vendrede) estas vidinda. Ankaŭ menciinda estas la granit-industrio. Per la regiona blueta granito oni fabrikas pavimerojn, trotuar-randaĵojn, blokojn por havenaj kajoj. Ankaŭ kadraĵojn kaj bazojn por la Vire'aj domoj : en Vire staras du belaj granitaj : muro antaŭ la urbdomo, menhir-forma monumento memore al la anoj de la Rezisto-movado.

Vire, 90 % detruita je la 6a de Junio 1944 pro bombado, estas nun moderna urbo, inter kies plaĉaspektaj konstruaĵoj staras malnovaj monumentoj. Vere vidindaj estas : Porte Horloge, mezepoka alarmturo, preĝejo Notre-Dame, gotikstila, ruinoj de mezepoka Kastelo. Mi volonte gvidos samideanojn. El pluraj lokoj en la urbo oni havas belan rigardon al la valoj. En la ĉirkaŭaĵoj staras ĉarmaj vilaĝaj preĝejoj (Mal-loué, Beamesnil), ankaŭ Kastelo de Pontécoulant (departementa Muzeo).

Vire havas du staciojn : unu fervojan (linio Parizo-Granville), alia aŭtobusan ; tendumejon, du banbasenojn (unu varmigitan), stadianon, tenisajn kaj globludejojn. Ankaŭ troviĝas tie Junulara Domo, Biblioteko kaj Muzeo. Fiŝkaptado (trutoj, ezokoj) estas facile praktikebla laŭ la multaj riveroj (400 kilometrojn longaj).

En Vire oni povas ĝui bonegan manĝadon en modernaj hoteloj. Fama specialaĵo de la urbo estas « l'andouille » (tripkolbaso). Ĝi konsistas el porkaĵo fumaĵita dum monatoj (almenaŭ tri) per fagligno. Kun buterpano ĝi estas bongusta almanĝaĵo. Ankaŭ la Vire'aj kukaĵoj estas frandaĵoj.

El la historio de Vire mi ĉerpos nur kelkajn faktojn kun ĝenerala intereso. En 890, Vikingoj per ŝipetoj venas laŭ la rivero Vire kaj okupas la urbon. En 1066, Vilhelmo, Duko de Normandio (naskiĝinta en Falaise, oriente de Vire), konkeras Anglujon. Multaj sinjoroj el Bocage partoprenas en la konkero. Henriko la, Reĝo de Anglujo, konstruigas la kastelon de Vire (1123). Dum la Centjara Milito, la Bocage-anoj ribelas kontraŭ la Angloj. Poeto O. Basselin instigas ilin. Fine de la 17a jarcento multaj protestantaj familioj (de drapistoj kaj paper-fabrikistoj) forlasas Bocage rifuĝante al Anglujo kaj Nederlando. En 1815, Marŝalo Grouchy retiriĝas en sian kastelon apud Vire. Poeto Chênédollé (1769-1833) amiko de Châteaubriand, verkas la unuajn romantikajn poeziaĵojn. Reĝo Karlo Xa, forpelita de la Revolucio (1830) tranoktas en

Vire survoje al Anglujo. Lin kondukas Admiralo Dumont d'Urville (naskiĝinta en Condé-s/Noireau, apud Vire), fama esploristo, malkovrinto de la antarkta Adélie-Tero. En 1944, Vire estas liberigita post longa batalado (2-9 Aŭgusto).

Mi denove skribas pri Olivier Basselin. Li estis drap-laboristo, kiu vivis en Vire en la 15a jarcento, precize en mallarĝa valo. Li verkis poeziaĵojn facilajn, trinkinstigajn, destinitajn por kantado. Ili havis la nomon « Vaux de Vire » pro la loĝloko de la verkinto. Ĉar ili poste devastiĝis, la nomon Vire anstataŭis la multe pli konata vorto « ville » (urbo). Tio estas la origino de la vorto « vaudeville », en esperanto « vodevilo ». Poste tiuj poeziaĵoj estis enmetitaj en teatraĵojn. En kelkaj francaj vodeviloj (19a jarcento) ankoraŭ troviĝas strofoj por kantado. Nun vodevilo estas komedio facila, kun lerta intrigo. La usona poeto Longfellow verkis belan poeziaĵon pri Basselin. Ĝi troviĝas en « Birds of passage ». En unu Vire-strato, kineto kaj ĥorkantistaro havas la nomon Basselin.



Jen estas du citaĵoj el la verkaro de Basselin, unu taŭga por esperantistoj, pac-amantaj homoj, alia amuza.

« Il vaut mieux cacher son nez
[dans un grand verre
Il est mieux assuré qu'en un
[casque de guerre ».]
(Multe pli bone estas kaŝi la
[nazon en granda glaso,
Ĝi estas pli sekura ol en milit-
[kasko.)

« Tout à l'entour de nos rem-
parts les ennemis sont en
[furie ;
Sauvez nos tonneaux, je vous
[prie. »
(Ĉie ĉirkaŭ niaj remparoj la mal-
[amikoj furiozas ;
Savu niajn barelegojn, mi pe-
[tas.)

Jen estas priskribo de mia urbo, kiu espreble interesos la legantojn de « Kulturaj-Kajeroj » kaj instigos ilin viziti la « lulon de vodevilo ».



Foto, Studio Polda, Vire

A. LEGRET
Delegito de U.E.A.
14, rue des Sablonnières
14 - Vire

GRAVAJ DATREVENOJ

Flugu al Grésillon



La aerlinioj de Hispanujo **Iberia**, en kunlaboro kun **Hispana Esperanto Instituto**, eldonis koloran faldfolion por inviti niajn hispanajn gesamideanojn iri al Grésillon per ĵet-aviadilo kaj aŭtobuso. La prezoj estas tre favoraj.

Hispanaj geamikoj, profitu la okazon.



Antaŭ 30 jaroj mortis en Norbacka

Selma Lagerlöf. La sveda verkistino, kiu ricevis la Nobel Premion pri Literaturo en 1909, estis konata en la tuta mondo pro siaj multaj verkadoj el kiuj la plej ŝatataj estis : « La legendo de Gösta Berling », « La mirinda vojaĝo de Nils Holgerson ». « La ringo de la generalo » estis tradukita en Esperanto.



Antaŭ 15 jaroj mortis en Princeton

Albert Einstein, naskita en Ulm en 1879. Tiu germana **fizikisto** jam en 1905 pruvis la rilaton inter fotonoj kaj elektronoj. En 1918 li stariĝis la ĝeneralan teorion de relativeco.

Thomas COOK

(Dua parto)

1870 : Neatendite, la Cook-vojaĝantoj troviĝas, en kelkaj landoj, antaŭ nesekureco pro militoj aŭ ribeloj :

— en Grekujo, 4 turistoj estas mortpafitaj de banditoj.

— iom pli poste, en Oberammergau, kie okazas prezentoj de la Pasiono, la karavano estas blokita : la trajnoj estas rekviziataj de la prusa armeo. Rapi- de Thomas kaj John redonas la biletmonon kaj klo- podas por rehejmenigi la klientojn.

Sed la tuja postmilito estas fruktodona. Londo- no, fare de angla komitato, volas sendi al Parizo 75 tunojn da nutraĵoj. John prenas sur si la trans- porton : heroa vojaĝo piede, perĉevalo, veturilo kelkfoje sen paspermeso : 5 tagojn por iri de Diep- pe ĝis Parizo.

Dum tiu mallonga misio, li starigas vojaĝpla- non : 150 anglaj turistoj venos por konstati la vun- dojn de « Gaja Parizo ».

La « Komunumo » momente interrompis tiun strangan distradon, sed tuj de la unuaj paco-lume- toj la trafiko rekomenciĝas.

AL SANKTA TERO :

Oriento proksima kaj malproksima allogas la Cook-karavanojn ; sed siavice la riĉaj vojaĝantoj allogas la endezertajn banditojn (tiuj, kiuj ilin akompanas, kaj tiuj, kiuj ilin atendas).

Post interkonsento kun la turka registaro kaj, fare de ĉiu turisto, pago de pas-imposto, oni sukce- sas daŭrigi la iradon. Oni eĉ vidas, paradante sur sia « barareska » ĉevalo, feste jungita, ŝejkon Mus- tafa akompani la Albion-filinojn, allogitajn de vo- jaĝo iel ajn pimentita de misaventuroj.

Sur la Palestinaj vojoj centoj da ĉevaloj, muloj, azenoj kapablis transporti 1.000 turistojn kun ilia ekipaĵo.

Ĉio troviĝas sub tendoj : kuirejoj, salonoj, man- ĝoĉambroj, dormejoj kun ferlitoj, litukoj, kovri- loj, turkaj tapiŝoj kaj eĉ, tuj de la ellitiĝo, banpel- von kun varma akvo.

Mulistoj, interpretistoj, servistoj, gardistoj akompanas tiun novan « Armada-on ».

Post kilometroj da poivo la vojaĝantoj malko- vras odorantajn herbojn, oliv-kaj-oranĝarbojn kaj bibliajn pejzaĝojn. Preskaŭ 12.000 turistoj revenis de tiuj modernaj pilgrimadoj kun mienoj de esplo- ristoj.

AL EGIPTUJO :

En 1868 T. Cook invitita de Ferdinand de Les- seps, ĉeestas, kun grupo da turistoj, la inaŭguron de Suez-kanalo, kiun la mondo atente rigardas. Nilo kaj ĝia historio fariĝas celo por la Cook-karavanoj.

1869 : Thomas luas 2 vaporŝipojn : Benda kaj Beniseff.

1870 : John, kiel regnestr-agento de la Kedivo, ricevas monopolon sur ĉiuj ŝipoj kaj organizas reg- ulan pasaĝer-transporton ĝis la 2-a Nilo-akvofalo.

1877 : unua kaj dua hoteloj estas konstruitaj en Luksoro kaj, por la ĉiam pli multaj vizitantoj, va- porŝipo fariĝas hotelo-ŝipo. Dum deko da jaroj, la malgranda ŝipanaro promeniĝas mirantajn vojaĝan- tojn, precipe sub tiu vintra egipta suno, kiu resan- nigas la malsanulojn. Antaŭ la ekiro, la turistoj ri- cevas Cook-konsilojn : bone provizi la monujon, atenti la noktan freŝecon, ne surmeti fezon aŭ tur- banon sed sunkaskon kun larĝaj bordoj, sin ŝirmi per sunombreloj ; la virinoj ne forgesu gazon kaj muslinon kontraŭ sablo kaj sunfrapo.

Sed okazis ke Araba-Paŝao ribeliĝis kontraŭ la Kedivo. Anglaj trupoj intervenis. La nesekureco sur la riverego fortimigis la vojaĝantojn. John sin turnis al transporto de vunditoj kaj resaniĝantoj. Pro lia rapida kaj nelacigebla helpo, li ricevis laŭ- dojn, citaĵojn, ordenojn. Oni konfidis al li gravajn kaj delikatajn misiojn. La plej memorinda estas tiu de Kartum, kies celo estis liberigi generalon Gordon en Sudano : 27 vaporŝipoj, 650 boatoj transportis 18.000 virojn kaj 130.000 tunojn da provizoj. Kvan- kam bonvolema, John Cook faris erarojn kaj sentis sin pli trankvila, kiam li renkontis sur la reira vo- jo, la armitajn balenbarkojn de la kanadaj ma- risto.

Tuj kiam paco revenas, la turistoj, pli ol iam, sopiras pri egipta suno. Cook rekonstruas floton, kies amiral-ŝipo estas Ramses-la-Granda. Glore, la Cook-flagoj salutas sur la Nilo la 3-an Cook-generacion. Oni multe skribis pri tiuj famaj vojaĝoj :

Surŝipe, « belegaj arabaj servistoj — kun blankaj roboj kaj ruĝaj « tarbukoj » cirkulas ĉirkaŭ la tabloj ». Vespere, « oni admiras la ŝanĝojn de la egipta ĉielo ». Je la maten-maĝo jen « poriga », ovoj kun lardo, fiŝo, varmaj kaj malvarmaj manĝaĵoj : lango, kokidaĵo, ŝinko, kaj ankaŭ konfitaĵoj kaj kompotoj ; teo estas servita kun Hentlet — kaj — Palmer biskvitoj. Matene kaj posttagmeze, okazas ekskursoj kaj promenadoj ; la pigruloj ludas briĝon. Plejsezone, la ŝipoj plenpleniĝas ; kiam oni ne ekskursas, oni surmetas silkajn bluzojn, delikatajn ŝtrumpetojn, sendifektan flanel-pantalolon aŭ smokingon. La virinoj laŭplaĉe fantazias pri siaj vestoj ».

La « Blackwood Magazine » aŭdacas skribi : « En Egiptujo, Sultano estas la normala monarko ; ĝia reala regnestro estas la angla guberniestro, lord Cromer ; la Kedivo estas lia oficiala reprezentanto, sed la vera tut-potenco en Egiptujo estas Cook-kaj-filo agentejo ».

La unua eminenta turista estis Generalo Grant, Usono-Prezidento. Poste, ĉefepiskopo Archibald Campbell Tait, kiu sukcesis, kun 15 personoj, atingi la Lazuran Marbordon, traŭrante Germanujon, dum bruegis la franca-prusa milito.

Ankaŭ la angla reĝa familio uzis la COOK-servojn, ne nur por gardi aŭ transporti pakaĵojn sed ankaŭ por sekurigi la reĝajn vojaĝojn. Cook speciale atentis la restadon de Reĝino Viktoria ĉe Lazura Marbordo. La agentejo akompanis la Caron kaj lian familion al Soktlando. Gladstone, Rudyard Kipling kaj aliaj kun Cook vojaĝis.

La 25-an de oktobro 1898, sur la vojo al Haïfa, popolamaso tute mirigata, rigardas impetege preterpasi, en polvonubo, eksterordinaran irantaron.

La germana « Sultano » sidas en veturilo. Apud la koĉero, John Cook, mem, kondukas la karavanon. Antaŭiras aŭ postsekvas generaloj kun pinto-kaskoj, agloj, kokardoj, epoletoj, sabro ĉe flanko, kaj la turkaj policanoj (en uniformoj malpli brilantaj).

Kvar tagojn pli poste, la imperiestra irantaro, tra Jaffa-pordo, John Cook sur la unua vico, eniras en Jerusalem.

Dum 10 tagojn, Cook zorgas pri ĉio : hoteloj, loĝado sub tendoj, eĉ por ĵurnalistoj, veturiloj, rajdbestoj, trinkmono...

Sed kio okazis? Subite la vojaĝo interrompiĝas, preterlasante Jericho Morta Maro, kaj Jourdain.

Reĝino Viktoria estas ĵus proklamita Hindujo-Imperiestrino. Al la hindaj Princoj, kiuj deziras viziti Eŭropon, John proponas siajn servojn.

Unue, Cook petas de la du anglaj politikaj partioj, moralan apogon. Poste li malfermas oficejojn kaj dungas reprezentantojn. Okaze de la jubileo de Reĝino Viktoria, li organizas la unuajn luksegajn translokadojn de Maharaĝoj.

Akompanantaro de unu el ili entenas : 2.000 servistojn, 50 familiarulojn, 10 elefantojn, 35 tigrojn, 1.000 valizojn kaj ankaŭ malgrandan kanonon. Alia maharaĝo estas sekvata de ŝafoj kaj bovinoj por nutri lin mem kaj lian sekvantaron.

Por alia, jen amuza okazaĵo en Romo-stacido-mo, en kiu li postulis reĝan akceptadon : la Cook-representanto petos de la staciestro, ke li surmetu sian plej belan uniformon kaj venu kun floroj por la maharaĝaj edzinoj ; dekduo da ĝendarmoj staras ambaŭflanke de malvolvita ruĝa tapiŝo ĵus luita.

En 1872, Cook, gvidas ĉirkaŭ la mondo kelkajn skotajn, amerikajn kaj rusajn turistojn. Li fariĝas « Times » - raportisto pri la vojaĝ-impresoj. La vojaĝo daŭros 222 tagojn ; samtempe kiam alvenos al tiu ĵurnalo la lastaj leteroj, la franca ĵurnalo « Le Temps » publikigas la felietonon de Jules Verne « La ĉirkaŭiro de la mondo en 80 tagoj ».

Thomas mortis en 1892. Pli poste ankaŭ John malaperis. La librotenado montras, je tiu momento : 3.262.000 biletojn (korespondantajn al 170.000.000 meloj. En la agentejo estis 1714 oficistoj (inter kiuj 980 deĵoris en Proksima Oriento, dum la vintraj monatoj). Oni estis disdonanta 13.948.000 reklam-flugfoliojn kaj la COOK-ĵurnalo havis specialan eldonaĵojn en Parizo, Vieno, Bombay kaj Melbourne.

La filoj de John, Frank, Ernest kaj Thomas daŭre funkciigis la agentejon ;

En 1920, ili subskribis kontraktojn kun la « Internacia Lit-vagon-Kompanio ».

Hodiaŭ Kook-kaj-filo, kiu loĝas en Berkeley Street en Londono havas 420 oficejojn kaj pli ol 10.000 oficistojn (2.000 en Londono). Ili organizas vojaĝojn kun 800 hoteloj, 700 ŝipoj, 500 fervojo-kompanioj kaj 150 aviadil-kompanioj. Ĉiujare ili disdonas 2.000.000 broŝurojn.

Oni povas revii pri tio, kion Thomas Cook estus efektiviganta en nia moderna vivo.

« Connaissance du Monde ».

(tradu : S.G.)

el Paul Brachon.

Nigra diamanto

LA TRUFO

Naskiĝo de la trufo — la plej multvalora kaj plej karpicema el la fungoj — restas ĉirkaŭita de mil sekretoj. Riĉeco atendas tiun, kiu malkovros nepran manieron por ĝin kulturi.

Battista Monchiero estas viro feliĉa kaj riĉa (li gajnas proksimume 10 milionojn da liroj ĉiujare). Li estas Direktoro en lernejo tute speciala : instituto, kiu celas dresi trufo-hundojn.

Okaze de vojaĝo en Perigord, la avo de S-ro Monchiero opiniis, ke la francaj truff - serĉantoj eraris, kiam ili uzis porkinojn « mallertajn. sen personaleco, kaj malmulte afekciajn », por trovi trufojn.

De tiu tempo oni provis dresi centojn da bestoj : celante trovi pli inteligentan beston, kun neerarema flarsento.

Por tion pruvi, tuj de sia reveno en Italujo la avo de S-ro Monchiero malfermis lernejon en Alba (Piemont). Oni kelkiom mokis tiun iniciaton. Certe, hundo ne estas tiel altirata de la trufo, kiel porko. Sed tamen ĝi povas fariĝi fungo-ĉasisto same kiel ĝiaj samuloj iĝas ĉasaĵo-ĉasisto aŭ krimulo-ĉasisto. Sufiĉas nur ĝin dresi kaj tion faras S-ro Battista Monchiero en 3 monatoj.

Unue, dank'al longaj marŝadoj la hundo familiariĝas kun la trufa tereno, la arboj, la argila-kalka grundo kaj kun la humo-odoro, kiu ĉie stagnas. Due, la hundo estas senigita je nutraĵo kaj, ĉar la trufo estas proksimume 15 cm. sub tero, oni enfosas viandon je tiu profundo ; la hundo estas devigata grati la teron por trovi tiun viandon.

Trie, la viando estas ŝmirata per trufo-kaĉo kaj tiamaniere la trufo-odoro asociiĝas al nutraĵo-bezono.

Poste, la viando malaperas el la miksaĵo kaj la hundo iĝas trufo-ĉasisto. Laŭ S-ro Monchiero, kiu ajn el liaj pensionuloj kapablas, post 3 monatoj detekti truffon, ĝin delikate elpreni el la tero, ĝin alporti al sia mastro tute sendifekta ; tiu detalo plej gravas ĉar vundita trufo rapide putras ĉiujare, kvindekda hundoj estas dresitaj en Alba ; estas sufiĉe kosta : por unu hundo 170.000 liroj. Sed laŭ S-ro Monchiero ĉiu hundo povas enspezigi ĉiujare ĝis : 780.000 liroj. Kondiĉe, kompreneble, ke la kampo estu favora kaj la jaro feliĉa. Tamen, povas okazi ke la plej perfekta ĉashundo trovas... nenion.

La italaj truffo-kulturistoj estas multe kuraĝigataj dank'al subvencioj, impost-rabatoj, malŝarĝoj kaj rekompencoj. En « Les Marches » - regiono oni faris novajn plantadojn sur 1000 hektaroj.

En Francujo la truffo-rikoltantoj malkvietiĝas : meznombre nia lando donas cent tunojn da truffoi : kio estas dekfoje malpli ol antaŭ unu jarcento. Pli speciale en 1890 oni ekstraktis 2 milionojn da Kg. ; en 1900 : cent dudek tunojn kontraŭ

6 tunoj pasintan jaron. En Carpentras antaŭ 1940 ofte oni proponis 10 tunojn ; en 1965 estis nur 80 kilogramoj. Tiu « nigra diamanto » kiel Brillat-Savarin ĝin nomis, kvankam ege kosta en magazenoj (300 F. por unu kg) ne plu sufiĉe « nutras » la rikoltantojn. Tio klarigas ĝian iompostioman malaperon.


Plue, kiam trufo estas matura, oni devas ĝin plej rapide ekstrakti : ĝi rapide difektiĝas kaj estas ne vendebla. Pli kaj pli, nur dum libera tempo, la terkulturistoj serĉas truffon. Tiu rikolto apenaŭ permesas « nutri » la necesan porkon, kaj konsekvence multaj el tiuj fungoj putras en tero. Tereno, hodiaŭ abunde trufo-riĉa, povas subite fariĝi (post unu jaro, post 10 jaroj) neproduktiva.

Kvankam trufo estas konata jam de la plej Antikvaj Tempoj oni neniam sukcesis igi ĝin ĝarden-legomo, kiel terpomo aŭ florbrasiko. Cetere, el la fungoj, nune, nur Parizo-fungoj estas kulturitaj laŭ raciaj metodoj. Sed la trufo restis vera biologia mistero ; ĝia evoluo, ĝia naskiĝo ankoraŭ estas sekretoj.

Pline la Fraŭlo, roma naturalisto, opiniis ĝin tera sekreciaĵo, grunda kalajo. Por Plutarque kaj Juvenal ĝi estis konglomerato el konjugita ago de fulmo, varmo kaj akvo kun la teraj mineralaj elementoj.

En Mezepoko oni plivole opiniis ĝin sorĉistino-salivo ; tamen kelkaj kampuloj asertis, ke trufo-ĝermo venis el la semo eligita dum pariĝo de damao kun damaino. Oni ankoraŭ kredas, ke estas muŝo, kiu, pikante kverko-radikojn naskigas la « nigran diamanton ».

En 1967 tre serioza medicina revuo skribis, ke trufo, same kiel visko, alia mistera vegetalo, estas astra planto veninta el alia astro ! Fakte Roger Cailleux, asistanto en Muzeo pri Biontologio konsideras, ke Theophraste, greka filozofa, posteulo de Aristote, estis la unua — 4 jarcentoj antaŭ nia erao — kiu asertis, ke



trufo estas vegetalo naskiĝinta el semoj.

Ĝis komence de nia jarcento multaj sciencistoj akceptis la popolan kredon Hodiaŭ la plej lastaj studoj permesas diri, ke vere, trufo estas fungo. Jam en 1729, Micheli, itala botanisto, dank'al rudimenta mikroskopo, montris, ke, sub ĝia nigra karapaco, la trufo — kiel ĉia ajn fungo — estas plenŝtopita de etaj grajnoj : la sporoj, kiuj permesas reproduktadon. Tio supozigas — origine — taŭgajn kondiĉojn je kiuj, post maturiĝo, la trufo ellasas siajn sporojn. Plejmulto el la grajnoj mortas ; tamen kelkaj sukcesas ĝermi. Tiu ĝermo grandiĝas kaj transformiĝas en micelion (elemento komuna al ĉia fungo), kiu estas la nutra elemento de la estonta planto. Tiu micelio similas araneo-reton. Kontraŭe al tiu de aliaj fungoj, kiu prosperas tuj kiam ĝi estas en tero, la trufa micelio estas tre postulema : unue, ĝi povas nutriĝi nur per la kverkosuko ; due, ĝi ne povas rekte fiksiĝi sur la kverko-ŝelo kaj bezonas peranton : tiu kverko-ŝelo devas esti kovrata de parazitaj fungoj : la « mycorrhises ». Kiam la micelia araneo-reto estas solide alkroĉita ĝi etendiĝas kaj energie pumpas la kverkon, kiu de tiam estas kondamnita al naneco !

Povas okazi — oni ne scias kial kaj kiam —, ke trufo formiĝu ! Ankaŭ povas esti nenio !

Multaj misteroj pri tiu naskiĝo igas la trufon rara.

Tamen oni malkovris, ke trufo pli ŝatas magra-kalkan grundo kun fekundebla ter-tavolo, maldika, por aerumado kaj defluo de la akvoj. Kverko-radikoj devas etendiĝi horizontale, ĉar la trufo ne ŝatas esti enprofundigita ; cele al tio la planto-vartistoj kulturis la junajn kverkojn en florpotoj, kies flankoj estas traboritaj de multaj truoj, kiuj ellasas la radikojn horizontale.

Nune oni ankaŭ scias, ke ne nur kverko taŭgas. La Italoj uzas avelarbojn kaj eĉ — kun relativa sukceso — eksperimentis sur lavendo-radikoj.

Kial, ĉirkaŭ la trufa kverko, formiĝas zono (dialekte la « cramadis ») sur kiu nenio alia kreskas ? Kelkfoje sur herbejoj oni trovas tiujn « sorĉistin-rondojn », kiuj entenas nur fungojn, malaperigante ĉian ajn kreskaĵojn ! Nur en 1945 oni malkovris la responsanton de tiuj « sorĉistin-rondoj » ; ĝi estas mikroskopa fungo, la « clitocybina », cetere tre potenca antibiotiko.

Tamen pri la « cramadis » de la trufa kverko, oni ankoraŭ nenion trovis ; la serĉistoj opinias, ke temas pri hormono (oni supozas, ke kunigata ago de kverko kaj trufo sekrecias substancon, kiu agas kiel malherbumanto) ; tio estas ankoraŭ ne evidentiĝinta.

Kial kverko estas ĉi tie multproduktiva dum alia malproksima je 10 metroj estas tute sterila ? ĉu estas ricevemaj arboj ? sed kiuj ? Kaj kial trufo ofte aperas, kiam la tereno ricevis « ŝokon » : muro-defalo, falo de arbo-trunkoj, pasado de pezaj maŝinoj. Mistero !

Kompreneble oni devas igi la trufo-kultivadon malpli hazarda. Jen kelkaj receptoj pli-malpli empiriaj, kiuj eĉ povas ridetigi.

Kiel S-ro Pierre Alicot, urbestro en Laroque-Gageac, oni povas kolekti glanojn kaj ilin planti en sian ĝardenon. Tiele li faris antaŭ 10 jaroj kaj nune li komencas rikolti trufojn. Tio povas ŝajni iom longa. Jen alia tekniko, kiun provis S-ro Sylvestre Delteilh, komence de nia jarcento. En arbaro fariĝinta neproduktiva oni tranĉas kelkajn arbojn por ĝin maldensigi. Oni detruas ĉian superfluan vegetalon, oni aerumas la teron kaj oni okazigas « ŝokon » pasigante ĉarojn kaj buldozojn ; ĝenerale,

post unu aŭ du jaroj la produktado rekomenciĝas. Tiamaniere Jean Ribiere en Coly (Dordogne) reunigis trufejon. Iom pli malproksime, en Cujac oni revigligis trufejon per abunda priverŝado de ... pom-brando ! Kompreneble tiuj provoj apartenas nur al hazardo, ŝajnas.

Sed temas pri sorĉ-arto, kiam la provoj okazas en laboratorio ! Entreprenema industriisto, S-ro Guiochon, estro de la Somycel (societo, kiu celas kultivi micelion por la Parizo-fungoj, en la ŝtonmino de Mesnil-le-Roi) decidis fronti, la problemon. En granda sekreto kelkaj agronomoj sub gvido de Doktoro pri Sciencoj, imagis solvon : simpla ŝajnas la problemo : izoligi la micelion, kiu naskigas trufon, ĝin kultivi en laboratorio kaj poste ĝin planti en taŭgan grundon. Do, oni putrigis trufon, oni rikoltis micelion, oni ĝin kultivis en « fermita vazo » (sekrete, ĉar nur Somycel tion eksperimentas).

Kiam la micelio atingas taŭgan evolu-gradon oni ĝin miksas kun humtero. Kiun oni vendas en nilono-saketoj, unu-kilogramaj, por 15 F. La kulturistoj metas tiun mulĉon en florpotojn kun glanojn kolektitajn sub trufokverko. Post kelkaj monatoj ili sendas prov-pecon al Somycel ; se la testoj, sekretaj, estas pozitivaj, la kverko de la florpoto havos ŝancon esti trufo-dona... post proksimume 15 jaroj ! ĝi havas nur ŝancon ĉar eksteraj kondiĉoj (grundo aŭ vetero) povas perturbi ilian evoluadon. Konklude, la sukceso varias inter 30 % kaj 80 %.

Kelkaj, cele al pli rapida profito, ŝmiras la radikojn de la kverko, antaŭe trufa, per tiu mulĉo ; bedaŭrinde tiu farmaniero estas pli hazarda ol prisemado.

S-ro Sylvain Floirat (el Dordogne), Nacia Prezidanto de la trufo-kulturistoj decidis redoni al sia naskiĝo-regiono la lokon, kiun ĝi antaŭe havis en la monda merkato.


Gravega celo fronte al grandega risko :

Jam de kelkaj jaroj, ĉirkaŭita de deko da teknikistoj elektitaj inter la plej bonaj. S-ro Floirat renovigis maljunajn plantejojn. En Coly, li kreis 20-hektaran pilot-trufejon kaj trufo-Muzeon. Li estas serioza kliento de Somycel ; ĉiujare li metas 20.000 kverkojn en florpotojn. S-ro Floirat estas — tiugrade — unika eksperimentisto ; la risko estas enorma : dekoj da milionoj estas investitaj dum 15-20 jaroj. Kompreneble oni multe esperas sukceson. Kiam ĉio iras bone unu hektaro povas doni 50 kg. da trufoj kun neta profito de 10.000 F.

La ekzemplo de S-ro Floirat certe estas sekvinda por gardi en Dordogne la multajn familiojn, kiuj forlasas farmojn por elmigri al urboj.

El « Lectures pour Tous »

(trad. S.G.)



RAKONTOJ

La noktovazo

Ĉar jam okazis al li en la lito pli ol unu bedaŭrindaĵo, ĉiuvespere Karotharulo plej atente antaŭzorgas pri eventualaj bezonoj. Somere, estas facile. Je la 9a, kiam sinjorino Lepik sendas lin kuŝiĝi, Karotharulo volonte faras promeneton kaj li pasigas kvietan nokton.

Vintre, la promeno fariĝas tedaĵo. Vana estas lia unua antaŭzorgo, ĉe la noktigo, kiam li fermas la kokinejon, li ne povas esperi, ke ĝi sufiĉos ĝis la morgaŭa mateno. Oni vespermanĝas, travesperas, la 9a eksonoras, jam delonge noktas kaj ankoraŭ eterne noktos. Necesas, ke Karotharulo duafoje antaŭzorgu. Kaj ĉiuvespere, kiel ĉiuvespere li demandas sin.

— Ĉu mi bezonas ? li diras al si ; ĉu mi ne bezonas ? Kutime, li respondas al si « jes », ĉu ĉar li ja ne plu povas prokrasti, ĉu ĉar la luno kuraĝigas lin per sia brilo.

Kelkafoje, sinjoro Lepik kaj frato Felikso donas al li la ekzemplon. Cetere, la neceseco ne ĉiam devigas lin malproksimiĝi de la domo, ĝis la stratfosaĵo, preskaŭ kamparmeze. Plej ofte, li haltas malsupre de la ŝtuparo ; laŭ hazarda decido...

Sed, ĉiuvespere la pluvo kvazaŭ traboretas la vitraĵojn la vento estingiĝis la stelojn, kaj la juglandarboj furiozas en la herbejoj.

— Oportune, konkludas Karotharulo post senhas-ta memkonsiliĝo, mi ne bezonas.

Li diras al ĉiuj bonan vesperon, ekbruligas kandelon kaj funde de la koridoro, dekstre, atingas sian nudan, solecan ĉambron. Li senvestiĝas, enlitiĝas kaj atendas la viziton de sinjorino Lepik. Ŝi streĉe ŝovfiksis al li la litkovrilon per ununura puŝbato kaj blovestingas la kandelon. Ŝi lasas al li la kandelon sed neniu alumeton. Kaj ŝi enŝlosas lin, ĉar li estas timema. Karotharulo unue ekĝuas la solulan plezuron. Li amas revii en la mallumo. Enpense, li ree travivas la pasintan tagon, li ĝojas pri tio, ke li ofte elsaviĝis kaj kalkulas pri egala bonŝanco por la morgaŭo. Li ĝue fieras, ke sinjorino Lepik ne turnos sian atenton al li du sinsekvajn tagojn kaj li provas endormiĝi kun ĉi tiu revio.

Apenaŭ li fermis la okulojn, li spertas konatan ĝenon.

— Estis neeviteble, diras al si Karotharulo.

Iu alia ellitiĝas. Sed Karotharulo scias, ke ne estas noktovazo sub la lito. Kvankam sinjorino Lepik povus ĵuri la malon, ŝi ĉiam forgesas meti unu. Cetere, por kio taŭgus noktovazo, ĉar Karotharulo jam antaŭzorgas ?

Kaj Karotharulo rezonas anstataŭ ellitiĝi.

— Frue, aŭ malfrue, mi devos cedi, li diras al si. Nu, ĵu pli mi rezistas, des pli mi akumulas. Sed se mi tuj pisas, mi pidos malmulte kaj miaj littukoj havos tempon por sekiĝi per mia korpovarmo. Proprasperte, mi estas certa, ke panjo vidos eĉ ne unu guton.

Karotharulo sin faciligas, sekurplene refermas siajn okulojn kaj bone ekdormas.

II

Subite li vekigiĝas kaj aŭskultas sian ventron.

— Ho ! ho ! li diras, io malboniĝas !

Antaŭmomente, li kredis sin kvita. Estis tro bonŝance. Hieraaŭvespere li pekis pro mallaboremo. Lia vera puno alproksimiĝas. Li sidigiĝas sur sia lito kaj kunstreĉas siajn pensojn. La pordo estas

ŝlosita. La fenestro havas stangojn. Neeble eliri. Tamen li ellitiĝas kaj iras palpi la pordon kaj la fenestrostangojn. Li rampas sur la planko kaj sub la lito liaj manoj remas serĉe al la noktovazo, kiu laŭ lia scio forestas. Li ree en- kaj ellitiĝas. Li preferas moviĝi, marŝi, piedfrapi ol dormi kaj liaj ambaŭ pugnoj enpremas lian ŝvelantan ventron.

— Panjo ! panjo ! li molvoĉe diras, kun timo ke oni aŭdos, ĉar se sinjorino Lepik subite aperus, Karotharulo tuj resanigita, ŝajnus primokanta ŝin. Li nur volas senmensoge pravigi en la morgaŭo sian aserton, ke li alvokis.

Kaj kiel li krius ? Ĉiuj liaj fortoj eluziĝas por prokrasti la katastrofon.

Baldaŭ dolorego ekdancigas Karotharulon. Li frapiĝas kontraŭ la muro kaj resaltas. Li frapiĝas kontraŭ la litteraĵo. Li frapiĝas kontraŭ la seĝo, li frapiĝas kontraŭ la kameno, kies ferkurtenon li fortege levas kaj enfalas inter la kamenstabletojn, tor-dita, venkita, pleje feliĉa.

La enĉambra nigro plidensiĝas.

III

Karotharulo endormiĝis nur ĉe la tagiĝo kaj li tramatenĝuas la liton, kiam sinjorino Lepik sovas la pordon kaj grimacas, kvazaŭ ŝi oblikve snufus.

— Kia strangaodoro ! ŝi diras.

— Bonan matenon, panjo, diras Karotharulo.

Sinjorino Lepik forŝiras la littukojn, klaras la angulojn en la ĉambro kaj ne daŭris longe antaŭ ol ŝi divenis.

— Mi malsanis kaj ne estis noktovazo, rapidas diri Karotharulo, juĝante, ke tio estas lia plej bona defendrimedo.

— Mensogulo ! mensogulo ! diras sinjorino Lepik.

Ŝi forkuras, reeniras kun noktovazo, kiun ŝi kaŝe tenas kaj lertmove glitigas sub la liton, taŭze starigas Karotharulon, alarmas la familion kaj ekkrias :

— Kiel do mi ofendis la ĉielon, ke mi meritis infanon tian ?

Kaj jen ŝi alportas viŝtukojn, ŝitelon da akvo, ŝi inundas la kamenon, kvazaŭ ŝi estingus fajron, ŝi skuas la litaĵojn kaj multokupe, plende, ŝi petas aeron ! aeron !

Kaj jen ŝi gestadas sub la nazo de Karotharulo :

— Malŝatindulo ! vi perdas do la saĝon ! jen vi do monstriĝis ! Vi vivas do kiel bestoj ! Se oni donus noktovazon al besto, ĝi ja scipovus ĝin uzi. Kaj vi, vi fantazias sternaĉon en la kamenoj. Dio atestu, ke vi min stultigas kaj ke mi mortos freneza, freneza, freneza !

Ĉemizvestite kaj nudpiede Karotharulo rigardas la noktovazon. Ĉinokte ne estis vazo kaj nun estas vazo, tie ĉe la litopedo. Ĉi tiu malplena blanka noktovazo blindigas lin kaj se li obstinus ankoraŭ nenion vidi, li havus aplombegon.

Kaj, ĉar lia ĉagrenita familio, la defilantaj rikanaj najbaroj, la ĵus alveninta leterportisto lin taŭzetas kaj insiste demandadas :

— Honorparolon ! fine respondas Karotharulo, kies okuloj fiksrigardas al la noktovazo, mi ne scias plu. Elturniĝu.

Jules RENARD
(trad. Jean LENEL)

La trista fraŭlino

En la tramo ĵus veturanta, mi tuj ekrigardis al juna, svelta virino, kvazaŭ kaptita de ŝia stranga beleco : longaj, nigrebrunaj harbukloj kadrantaj neĝblankan vizaĝon, kaj la okuloj !... Grandaj, preskaŭ nigraj, ili esprimis iun mildan, sed konstantan tristecon. Laŭaspekte, ŝi estis dudekdu-du-dek kvin jara.

Dum kelke da tempo, ofte ni uzis la saman tramon por iri al la laboro, kaj nevole, sed daŭre, mi observis ŝin. Multfoje, ankaŭ dumtage, venis en mian kapon la penso : « Kial ŝi estas tiel malgaja ? ».

Foje, hazarde, ŝi preterpasis min sur la strato, kaj mi sekvis ŝin por ekscii, kie ŝi loĝas. Precize, en ŝia hejma-strato mi havis konatulojn. Mi petis ilin informiĝi. Ili diris, ke neniam oni povas vidi ŝin akompanatan de fraŭlo. Ŝi estas ne atingebla, ne alpaŝebla.

Iom post iom, mi jam konis ŝiajn robojn, ŝian bonodoran parfumon. En la tramo, ŝi ofte legis amromanojn.

Iufoje, mi havis la okazon vidi impertinentan junulon alproksimiĝi al ŝi kaj postuli tujan interkonatiĝon. Ŝi timeme forkuris.

Dum du jaroj mi observis ŝin, kaj vane meditis sen povi solvi la sekreton : Pro kio, aŭ pro kiu, ŝi enĉagreniĝis tiel profunde ? Ĉu mortis ŝia fianĉo ? Ĉu ŝia amoro estis tiel granda, tiel profunda, ke ŝi ne povas konsoliĝi ?

Kaj somere, dum du monatoj ni ne plu interrenkontiĝis, kiam subite en septembro — ho, ĉu mi povis kredi je miaj okuloj ? — mi revidis fraŭlinon tute ne tristan ! Ŝi kontemplis la mondon serene, vivĝoje... Kien malaperis la bela, pala vizaĝo, la belega longa hararo ? Ŝia haŭto estis bruna. Ŝi dikiĝis iomete, kaj havis mallongajn frizaĵojn :

Entute, mezbeleta virino ne pli interesa ol multaj aliaj similaj. Poste, mi rimarkis, ĉe konvena fingro, la gefianĉan ringon kaj ĉio klariĝis. Certe, mi pensis, ŝi forgesis sian mortintan amanton ! Ho, tiel finiĝas la plej grandaj amoroj !

Sed hazardo baldaŭ pruvis al mi, ke mi eraris.

Renkontiĝante kune kun iama profesoro ĉe la tram-haltejo, ni komencis interbabiladi pri la malnova lernejo, pri profesoroj, pri studentoj, kiam alvenis la tramo. Ankaŭ mia nekonatulo. Per rideca kapklino ŝi salutis al la profesoro kiu resalutis. Ekscite, mi demandis la profesoron : « Ĉu vi konas ŝin ? » — « Jes, ŝi estis lernantino mia », li respondis. Tuj, mi rakontis pri miaj observadoj kaj supozoj, aldonante : « Kial ŝi dumlonge restis fraŭlino, kaj tiel malgaja ? » — « Ho, la solvo estas simpla, li respondis, ankaŭ en la klasoĉambro ŝi restis nekonfidema, ĉiam sidanta sur la unua benko. Ĉar ŝia aŭd-povo ne estis bona. Ne, ŝi ne estas vere surda, sed oni devas laŭtege paroli al ŝi kaj pro tio ŝi iĝis tre hontema. Pro sama honto, ŝi neniam volis uzi specialan aŭdaparaton ».

Nun, mi ĝojas, ke finfine ŝi trovos feliĉon en geedzeco.

— Do, mi ne tute eraris. Efektive, same kiel fama skulptisto povas krei ĉefverkon el sensignifa vizaĝo, ankaŭ tristeco povas plibeligi virinon. Kaj, ĉu estas pli granda malĝojo por fraŭlino, ol dubo pri amindumo de afabla, beleta junulo ? Kiel diveni flustran amdeklaron se, vane, oni streĉas siajn orelojn kaj aŭdas nenion.

— « Ĉu, ĉifoje, la amanto de tiu-ĉi malgaja fraŭlino malkovris ŝian sekreton kaj stentore deklaris sian amon ? ».

— « Aŭ senvoĉe », — rideteme respondis la profesoro.

Ladislav TIHANYI.



EKSTERLANDAJ AMIKOJ

La kresko de la paper — kaj pres-kostoj devigas nin iom altigi la prezon de la abono al nia revuo ek de la unua de Marto. Bonvolu konsulti la lastan kovril-paĝon.

Oni povas pagi ankaŭ rekte al :

P. Babin, 13, boulevard de la Chauvinière 44 - Nantes Francujo.

Poŝtscekkonto : Nantes 2 813 61.

NEPRE PAGU PER POŝTĈEKO AŬ BANKĈEKO.

Ne sendu monon rekte al la supra adreso, ĉar la poŝto detenas procenton de la sumo !

POR VIA DISTRO

NIA KONKURSO

Ĉar nia revuo aperis iom malfrue, ni konsentas ke vi sendu la solvojn de la N° 6 Nov-Dec. samtempe kun la solvoj de la nuna numero (en kiu vi trovos duoblan konkurson, por anstataŭigi tiun neaperintan en la N° 5 pro eraro de la eldonisto). Legu la regularon en la N° 6.

Unua problemo : (10 poentoj)

1 fringo	7 palato	13 tabelo	19 karoto
2 arabo	8 piano	14 pendi	20 kampo
3 plano	9 kroni	15 ofendi	21 korbo
4 fiasko	10 bovo	16 rento	22 karto
5 plando	11 kolera	17 barako	23 okulo
6 morto	12 ponto	18 besto	24 konko

Elprenu el ĉiu supra vorto unu literon tiel, ke la restintaj literoj lasitaj en siaj antaŭaj lokoj, formu novan vorton. La elprenitaj 24 literoj en la numerita vico formas malnovan ĉinan proverbon kun profunda senco.

Dua problemo : (20 poentoj)

En la ĉisubaj frazoj estas kaŝitaj dek eraroj. Eltrovu ilin, kaj korektu. Estas kalkulitaj po 2 poentoj por ĉiu eraro ĝuste korektita, sed, atentu ! Estos forprenita po 1 poento por ĉiu malĝusta korekto.

1) Dekope ok estas okdek, kaj okope dek donas la saman sumon.

2) Mi pasis ekzamenon malfacilan por lernanto, kiu estis ĵus forironta al la armeo.

3) Donu al mi la sitelon por ke mi iros serĉi la trinkaĵojn : la vino estos trinkita kun plezuro.

4) Por transporti min al la urbon, mi havas nur kompateman azenaĉon.

5) Mi demandas vin, se vi sentas vin pli sanan.

Tria problemo : (10 poentoj)

Litera problemo

La solvo konsistas el 54 literoj, kiuj estas numeritaj. La literoj estas troveblaj per la sekvantaj ŝlosilvortoj :

4	1	40	38	39	17	12 = ege granda homo
31	5	6	46	45	28	27 = skribilo
31	9	7	33	20	13	22 14 = aŭstralia bestego
26	15	2	35	21	41	= grandega frukto
1	25	32	47	17	48	26 1 12 = bela jarparto
53	44	43	17	52	14	= homa korpoparto
16	34	19	26	27	11	35 10 54 41 = scienco pri la tertremoj
18	50	51	36	45	=	sciura frandaĵo
29	24	5	8	30	23	12 = fiŝeto en oleo
37	20	49	42	22	13	14 = flava mineralo
6	25	4	15	7	17	3 21 27 = sudamerika ŝtato
26	32	16	34	19	54	1 35 = nordamerika riverego
10	2	9	8	3	41	11 45 = floro
1 — 54	=	tre	bela	kaj	prava	diraĵo de la angla poeto Lord Byron.

Kvara problemo : (10 poentoj)

1 enketo	7 batilo	13 nadiro	19 sireno
2 zenito	8 ardezo	14 peruko	20 vanelo
3 veneno	9 filino	15 elfosi	21 katino
4 viziti	10 lanugo	16 lisboa	22 tereno
5 kolego	11 kerubo	17 faruno	23 nikelo
6 anteno	12 tuniko	18 karesi	

Tra la supra videblaj 23 vortoj iras interesa proverbo, kiu konsistas el 46 literoj. La unua litero de la verbo estas en la unua vorto, ĝia dua litero en la dua vorto, kaj tiel plu ĝis ĝia 23a litero kiu estas en la 23a vorto. En tiu vorto la proverbo turnas sin kaj komencas reiri tra la samaj vortoj ĝis la unua vorto, tiel, ke ĝia 24a litero estas en la 23 a vorto, ĝia 25a litero en la 22a vorto, ktp. kaj fine ĝia 46a kaj lasta litero troviĝas en la unua vorto.

La literoj 1-23 de la proverbo estas troveblaj en la antaŭaj duonoj de la vortoj, la literoj 24-46 en la malantaŭaj duonoj de la vortoj.

Amuzaj problemoj : (apartaj de la konkurso)

Solvo de la laste aperintaj problemoj :

Pri aĝoj :

Estu « x » la aĝo de Sro Bulman kaj « y » la aĝo de Sino Bulman. Estu « a » kaj « b » iliaj respektivaj aĝoj kiam ili geedziĝis. Laŭ la diroj de Sro Bulman :

$$ax - by + ay - bx = 553$$

$$(a - b) - (x + y) = 553$$

Nur du paroj da faktoroj donas 553 kiel rezulton :

$$1 \times 553 \text{ kaj } 7 \times 79$$

La unua paro ne estas konservinda ĉar ankaŭ la sumo de la aĝoj estus 553.


Do : sumo de la aĝoj : 79 — diferenco : 7.

Aĝo de Sro Bulman : 43 — Aĝo de Sino Bulman : 36.

GRAMATIKO PER BONHUMORO

- « **KIA** : ekkria kaj demanda adjektivo, kiu montras la kvaliton, naturon aŭ specon.
KIEL : ekkria kaj demanda adverbo signifanta « kiamaniere, kiagrade. »


(Plena Vortaro).



- Kiel mi povus vidi ? Forprenu vian ĉapelon !
— ?
— Dankon !



- Kiaj klientoj ! Tute nova pinĉtirilo nun per-
dita !



- Kia surprizo ! Mi certigas al vi, karulo, ke mi
tute ne komprenas !

Niaj perantoj

- Aŭstrio** : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse 2, LINZ (45 aŭstr. ŝil.).
Belgujo : S-ro Guyot Mateo, 18, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (85 fr.).
Britujo : S-ro Frank Ashpole, 127, Midford Rd, Combe Down, BATH BA2 5Rx (15 ŝil.).
Ĉeĥoslovakio : S-ro Dezidero Koronczí, Nabrezie Metoda 1707/16, PŘIEDVIDZA (2 us. dol.).
Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE.
Finnlando : S-ro Joel Vilkki, SOMERO 9 - Pĉk. : Tu 60253 (9 mk.).
Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, 35 - KASSEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brücke 22, pĉk. Frankfurt (M) 234-759 (6,2 mk.).
Hispanujo : S-ino Jozefino Monter Palomar, Muntaner 416, 1º, la, BARCELONO (110 pes.).
Italujo : Itala Esperanto-Federacio, Via Po 7, TORINO (1.000 lir.).
Japanujo : S-ro Tara Nišiumi, 6-31-19 Kita-Koiwa Edogawa-Ku, 133, TOKIO - pĉ Tokio 44163 (640 jenoj).
Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfolio 239 (1520 d.).
Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, CAPELLE AAN DEN IJSSEL, ZH pĉk. 209721 (7 guld.).
Norvegujo : S-ino Marit Delor, Solveien 143-B, LJAN.
Pollando : Asocio de Esperantistoj en Pollando, Nowy Swiat 27, VARSOVIO (60 zl.).
Rumanio : S-ro Adrian Boldan, p.k. 1412, BUKUREŤTI - 6. (27 lei).
Svedujo : S-ro Roland Dupuis, Helgagatan 36, uppg 13, STOCKHOLM Sö pĉk 157007 (10 kr.).
Svislando : S-ino H. Chavan, rue Etraz 16, LAUSANNE (7 sv. fr.).
Tajlando : S-ro C.L. Unchitti, GPO box 1231, BANGKOK (2 us. dol.).
Usono : S-ro D.W. Hoffman, 1444 Leslie Street, HILLSIDE (N.J.) (2 dol.).
Aliaj landoj : Ni serĉas perantojn en aliaj landoj. Oni povas pagi la abonprezon per steloj (20 st.) aŭ respondkuponoj (12 respk.), per libroj aŭ per neuzitaj poŝtmarkoj. Sin turni al la Direktoro.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ
Maine-et-Loire
FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iam ajn karavanojn frue anoncitaĵn

Akceptas :

- Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
- Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
- Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
- Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
- Por studi specialajn problemojn ;
- Por inter amikoj gaje libertempi ;
- Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

venu al la esperantista kulturdomo

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo